


# PONTO ☆

*Jaro 1 N-ro 1 (1) Organo de Sunda Esperanto Agado Februaro 2002*

## PONTO
### grava komuna projekto en la Sunda Regiono!

Krom la gazeto kiun vi nun tenas en via mano eblas aliĝi al la ”Reta agado”, vidu apude, kaj estas en prilaboro hejmpaĝo por la regiono kun bazaj informoj.

### 2-a renkontiĝo por planado de SEA
### 23-a de februaro

Programo:

Kl 10.00 Bonvensaluto
- Diskuto pri Ponto
- Kontaktreto
- Planado de komuna agado
- Informa laboro
- Kursoj

La ejo estas Riksbyggen en Järnvägsgatan 18, super la aŭtobus- kaj trajnstacio. Ni kolektiĝu ekster Riksbyggens Kundcenter (butiko ĉe la strato) kaj ni kune eniru. ¨Manĝejoj estas ene en Knutpunkten aŭ vidalvide de Järnvägsgatan je kelkminuta promendistanco.

Koran bonvenon
Klubo Esperantista de Helsingborgo
**Ann-Louise Åkerlund**
telefono 042-291262 aŭ 042-186639 (oficejo)

**Estimataj legantoj!**
Jen la nova formo de nia gazeto, kunlaborante kun niaj najbaraj kluboj en Helsingborg, Lund kaj Malmö. Mi deziras al ni ĉiuj sukcesan kunlaboron!

Sven Friis Jørgensen

**Karaj membroj**
Kontaktilo ĝis nun regule aperis fine de februaro, aprilo, aŭgusto, oktobro kaj decembro. Ĉi tiu n-ro 2 aperos la 8-an de februaro. Jen la jarraporto. La kalkulaĵan raporton vi povas mendi ĉe ni (Ib kaj Jytte Sunekær), se vi deziras ĝin.

**Karaj Karin Lindquist kaj Sten Svenonius**
Ĝis nun mi havis eblecon legi vian revuon, La Folio. Nun niaj membroj ankaŭ povos legi ĝin, kaj viaj membroj povos legi nian Kontaktilon. Vi faris la pioniran laboron, kaj ni povas rikolti la rezulton. Estos interese vidi kiel nia grupo funkcios.
Ĝis almenaŭ ĉe la SEA-kunveno la 23-an de februaro en Helsingborg.

Jytte Sunekær

### Sveda Esperanto-Federacio kongresos en Västerås la 3-an ĝis la 5-a de majo

**El la programo:**
Jam vendrede vespere estos spontana **interkona vespero.** **Marina Korot** kaj ŝiaj amikoj kaj ankaŭ **Kaj Stridell** promesis distri nin. Krom la statutaj aferoj okazos inter alie interesa **podia debato.**
La programo ne estas preta sed ni informos iom post iom.

Koran bonvenon!
Wim Posthuma prezidanto de la klubo en Västerås

### Reta Agado

*Sunda Esperanto Agado* estas nomita reta projekto, kaj plurparte øi estas eæ interreta. Ni utiligas la reton por distribui Ponton al la danoj. Certaj personoj laboras pri retpaøo kie ni havos informon pri aktiva¼oj en la SEA-kluboj. Multe laboris *Rolf Ullfors* pri la paøaranøo de la hejmpaøo sed nepre bezonatas intereso kaj kunlaboro de ceteraj teknikemaj esperantistoj.

### La Agado- Listo

Jam aktiva kun 27 membroj retpoþtlisto *Agado-L* havas gravan signifon por nia kunlaboro. Øi estas ekskluziva listo por SEA-anoj kaj ne konkuranta kun la multaj aliaj listoj. Øia celo estas ebligi rapide informi pri gravaj nova¼oj. Tial æiuj esperantistoj en la SEA- regiono kun retadreso estas admonitaj aliøi al øi.
Bonvolu kontakti min por pli da informo kaj aliøo:

Johan Svenonius / johan@agado.net

### Jarkunveno de DEA, DEFA kaj Esperanto-Forum 16-17.03 2002

**Informoj sur paĝo 6 !**

### Sunda Esperanto Agado
Reto de la Esperanta kunlaboro en la Sunda regiono

Redaktionskommitté/*redakta komitato:*

Kontaktperson: *Karin Lindquist* *karin@agado.net*
Sergels väg 14A, SE-217 57 Malmö +46 40 98 01 20

Övriga/kromaj anoj: Sten Svenonius (paøaranøo)
Helen Claesson (desegna¼oj), Johan Svenonius (tekniko),
Gertrud Lund (korektado), Per-Olof Johansson (presado)

Nästa Ponto utkommer ca 22/3.

Skicka allt material till
*Karin Lindquist* senast den 11/3



ISSN 0907-127X

# La Folio

Klubo Esperantista de Malmö

*Jaro 72 N-ro 1 (671)* » Ĉiam antaŭen «

Fondita en 1906


JARKUNSIDO/årsmöte
Klubo Esperantista de Malmö
27-02 2002

Tagordo de Jarkunsido

1. Elekto de prezidanto por la jarkunsido
2. Aprobo de la tagordo
3. Ĝustigo de listo de elektantoj
4. Demando pri laŭstatuta anonco de la jarkunsido
5. Elekto de protokolkontrolanto
6. Jarraporto de la estraro
7. Raporto de la revizoroj
8. Demando pri malŝarĝo de la estraro
9. Elekto de prezidanto por la jaro 2002
10. Elekto de 2 estraranoj kaj 1 anstataŭanto por 2 jaroj
11. Elekto de 2 revizoroj kaj 2 anstataŭantoj
12. Elekto de studkomitato kaj studsekretario
13. Elekto de informa komitato kaj informa sekretario
14. Elekto de programkomitato kaj programsekretario
15. Elekto de diversaj funkciuloj
16. Elekto de elektoprepara komitato
17. Decido pri vojaĝkontribuo al la jarkunsidoj de Sveda Esperanto-Federacio kaj
Eldona Societo Esperanto por oficialaj reprezentantoj
18. Elekto de reprezentantoj de KEM por la supre nomitaj jarkunsidoj
19. Eventualaj proponoj por la jarkunsido de SEF
20. Diversaj raportoj
21. Ceteraj elektoj kaj demandoj

Koran bonvenon al la jarkunsido!
La estraro




Kassören när du betalt din avgift!

## Medlemsavgiften

Glöm inte betala din medlemsavgift för 2002 så att du bl.a. kan erhålla den nya regionstidningen **PONTO!**

De som inte betalt när detta nummer skickas ut får ett inbetalningskort i tidningen.

Naturligtvis finns det många andra trevliga tidningar, se förra numret av La Folio.

### EL LA KLUBA VIVO

Miksa vespero 23.01

Tiam ni havis nian unuan klubkunvenon por la jaro.
Karin Lindquist parolis pri la lingva situacio en la mondo kaj montris tabulon pri la plej uzitaj lingvoj, el kiuj mandarina lingvo estas numero unu. Per helpo de Bernt ŝi daŭrigis per diabildoj de floroj, tiel belaj ke oni sopiras someron. Estis ankaŭ amuze vidi fotojn de esperantokunvenoj de la ”malnova” tempo. Poste ni festis la baldaŭan naskiĝtagon de Gertrud Lund per kvarobla vivuo kaj eksterordinare bongusta kaftablo. Ni finis per lingva ekzerco pri nomoj kaj rekono de diversspecaj arboj pere de folioj. Tre utile kaj necese, ĉu ne?

Asta Schaedel

## Kurser i esperanto
### Malmö

*Esperanto 1* och *Esperanto 2* lördagar kl 10-13 startar efter anmälningar.
(Ledare Sten Svenonius)

*Esperanto 3* lördag 16/3
kl 10-13.
(Ledare Beatrix Svenonius)

Föranmälan till *Esperanto 1, 2 och 3* på telefon 040-191477 till resp. lärare.

*Konversationskursen*
äger som tidigare rum på måndagar mellan kl 19.00-20.30 i klubblokalen med start den 14/1 2002.
Den är öppen för alla, även tillfälliga besökare.
Ledare Kjell Persson.
Telefon 040-401503.


Malmö Esperantoförening
*Kronetorpsg 94, SE - 212 27 MALMÖ*
☏ 040-18 71 90
Poþtøiro: 3 87 14 - 2

Prezidanto:
*Sten Svenonius* sten@agado.net
☏ 040-19 14 77

# Kontaktilo

**Membrogazeto de K.E.K**
**Konversacia Esperantista Klubo Kopenhago**

N-ro 2 (640) Marto — Aprilo 2002 66-a jaro



**Kopenhago**

LA ESTRARO

Prezidanto
Jytte Sunekær
Højlundshusene 16
3500 Værløse
Tlf.: 44 48 47 26, E-poŝto:
Jytte.Sunekaer@mail.tele.dk

Kasisto
Ib Sunekær
Højlundshuseane 16
3500 Værløse
Tlf.: 44 48 47 26
Poŝtelefono: 22 42 09 29
Ĝirkonto de K.E.K.
202 55 58

Sekretario kaj vicprezidanto
Bent Wiinberg
Nældebjerg Allé 30
2670 Greve
Tlf.: 43 90 42 01
E-poŝto: teo@post11.tele.dk

Redaktoro
Sven Friis Jørgensen
Bellahøjvej 130, 2. tv.
2720 Vanløse
Tlf.: 38 28 25 66, E-poŝto:
svenfriis@hotmail.com

Membro
Helen Claesson, Bellahøjvej
130, 2. tv., 2720 Vanløse
Tlf.: +45 38 28 25 66

Anstataŭanto
Ana Røssum, Brunevang 30
2700 Brønshøj
Tlf.: +45 44 92 10 83

Hejmpaĝo de KEK:
http://www.esperanto.dk/kek

## Jarraporto pri la agado 2001

La membrocifero estas 57, kiu dividiĝas jene : 46 aktivaj, 6 familiaj, 4 pasivaj kaj 1 honora. Nia gazeto, Kontaktilo regule aperis 5-foje. Okazis 20 ordinaraj kunvenoj + 2 kromaj pro eksterlandaj gastoj + 5 estrarkunvenoj.
Helen Claesson kaj Sven Friis Jørgensen hejmenvenis post E-kurso en Karlskoga kaj entuziasme raportis.
Ni partoprenis la danan jarkunvenon en Amager Kulturcentro, Kopenhago.
Eksterlandanoj vizitis nian klubon: Stokholmano, bulgarino & belgo (Kim Henriksen zorgis pri ilia loĝado).
El la temoj prezentitaj al ni: poŝtelefonsistemo, aktivado en la esperantomovado, Eŭropa Unio – novaj membroj/novaj problemoj, videobendo kun filmo.
Nederlandino kaj germano estis niaj gastoj dum kelkaj tagoj. Ili faris prelegeton en la klubo.
De la Universala Kongreso en Zagrebo hejmenvenis pluraj, kiuj povis multe raporti.
Germanino el Krefeld rakontis pri E-kunvenoj ĉe tiu landlimo.
Pri la temo E-kantoj en Nordio ni pasigis plurajn partojn de la kunvenoj kaj finis per kantareto kun 6 el la plej preferataj el niaj kantlibroj. Vizitis nin preleganto pri muziko. Ŝi kunagis.
Ni voĉlegis el "La paroladoj de Zamenhof dum la unuaj du Universalaj Kongresoj ". Ni trovis ilin interesajn kompare kun la nuntempa situacio.
Dum kunveno en Malmö ni kune kun la kluboj de Malmö, Lund, Helsingborg interkonsentis pri komuna gazeto, kiu nomiĝos Ponto.
Ni aranĝis 12-tagan Esperanto-ekspozicion en la biblioteko de Vaerløse.
En majo membro de KEK tradukis gvidtekston por Brazila kurso de Esperanto al la dana. La kurso estas elŝutebla el la hejmpaĝo www. cursodeesperanto.com.br/en/index.html

**El de la ekstere ofertitaj aranĝoj**, almenaŭ mi partoprenis en jenaj:
Kulturprelegservo, tiu pri la enciklopodioj. Jens S. Larsen prelegis.
Klubo Esperantista de Malmö: La printempa festo temis pri diversaj teatraĵoj faritaj de la klubanoj.
La E-klubo de Århus: Stanislaw Mielczarek aktivigis nin pritraktante la estontecon por Esperanto.
La fervojista klubo invitis al kunveno kun ĵurnalisto de la loka televido en Ishøj. Tiuokaze temo pri granda festo estis aktuala. Eksterlandanoj kaj nordjutlandano klarigis kiel ili iam festis. La grupo Esperanto Desperado sin prezentis.
- La somera ekskurso estis tre bela: vizito en la Muzeo de Ole Rømer.
- Studgrupo laŭ "Paŝoj al plena posedo" de William Auld.

Raportis Jytte Sunekaer

## Kluba raporto

16.01 Ni eluzis la eblecon iomete estrarkunveni kaj pritraktis nian situacion. Poste ni studis laŭ la lernolibro de Aleksander Kogan.

Jytte Sunekaer

**Rilate al Esperanto-kantoj en Nordio** ni elektis la jenajn 6:
La milda tago helas nun. – La feliĉa tago de Svante. – Paliĝas l'arbaro. – Vintra kanto. – Kiel en junaj tagoj. – Danlando estas mia hejmo ĉarma. En nia kantareto vi vidos la tekstojn kun mencio de la aŭtoroj kaj la tradukistoj kaj la melodiojn.

## Raporto pri Retpaĝa Semajnfino aranĝita de DEA

Ni estis 10 partoprenantoj. Jacob Nordfalk gvidis la teknikan kaj Kim J. Henriksen la enhavan grupon. Ni komencis per esprimo de niaj spontaneaj opinioj pri la ekzistanta hejmpaĝo. Sur la granda tabulo ni aranĝis la diversajn temojn kun iliaj rilatoj. Poste Jacob sur granda ekrano montris la diversajn paĝojn de la hejmpaĝo. Ni spektis aliajn. – Ni dividiĝis en grupojn, teknikan kaj enhavan. La skizita skemo estis pli detale prilaborita. La teknika grupo verkis la eniran paĝon. Poste ni laboris per 5 komputiloj, kiujn Jacob disponigis al ni. – Fine ni prezentis ĉiu sian laborkampon.
Du tagoj de 10-a ĝis 18-a horo forflugis en agrabla etoso.

Jytte Sunekaer

## Libroservo

situas en Vester Voldgade 94, st. mf. kaj funkcias ĉiun 1-an kaj 3-an merkredojn de la monato je la horo 18.00-19.00, la samajn datojn kiel la klubkunvenoj.
Eblas mendi telefone:
44 48 47 26 aŭ e-poŝte:
libroservo@esperanto.dk

Ib Sunekaer

Klubo Esperantista de Helsingborgo

## … jarfine al IF

Sub tiu devizo . 200 esperantistoj de plej diversaj a oj renkonti is en la germana urbo Magdeburg la 27-an de decembro 2001 is la 3-a de januaro 2002. La efa organizanto Hans-Dieter Platz – karese nomita ”HDP” de la partoprenantoj – jam la 18-an fojon okazigis altkvalitan aran on kun familia etoso. La partoprenantoj venis efe el Germanio, Belgio, Nederlando kaj aliaj e ropaj landoj, sed anka el foraj landoj kiel Usono kaj Dagestano (rusa respubliko e la Kaspia Maro).

Ni lo is en junulara gastejo meze en Magdeburg. La granda renovigita konstrua o oferis abundan spacon por la infanoj ludi kaj por la plenkreskuloj a skulti prelegojn, danci a babili en la ”knajpo” (trinkejo). La programo oferis 9-10 prelegojn tage, krom kursojn de jumeiho-gimnastiko, dancado, bakado, origamo kaj Esperanto (por malpli spertaj esperantistoj).

IF signifas *Internacia Festivalo* kaj estas aran o por esperantistoj 25 is 55 jaraj, kaj familioj. La gejunuloj havas propran aran on, kiu dum la us pasinta jarfino okazis en Rothenburg. (Pri tio Johan Svenonius povus rakonti.) La kadra temo de IF i-foje estis ”Unu mondo – kvin kontinentoj, cxu komputila tutmondigxo?” (Jes, kun ”x”!) Okazis prelegoj pri tutmondi o, komputilado, komunikado, diversaj landoj, scienco kaj instruado. La infanoj havis apartan programon.

Post vesperman o ni kolekti is en la halo por interkona vespero, magia vespero, kviza vespero kaj koncertoj de Mikaelo Bron tejn kaj Elena Pu ova. La internacia vespero estis parte amuza parte embarasa. Ne iuj sufi e bone kantis …

La knajpo estas la dire la plej fama trinkejo en Esperantujo. Tie ni pasigis la vesperojn kaj la pa zojn inter la prelegoj. Multaj el la ”IF-anoj” partoprenis jam plurajn fojojn, kelkaj e ekde la komenco, kaj viglaj diskutoj transsaltis la tablojn. Grava temo estis: la mondo post la 11-a de septembro.

Venontan jarfinon IF okazos en iama akvokastelo en Borken-Gemen en okcidenta Vestfalio. Se vi volas scii pli, vidu la ttt-ejon www.internacia-festivalo.de a scribu al IF, Hans-Dieter Platz, Postfach 1148, DE-34303 Niederstein, Germanio. Vi certe ne beda ros se vi decidus fari i ”IF-ano”!

Ann-Louise

---

*La Esperanto klubo de Lund*

Karaj LEK-anoj, vi nun tenas en viaj manoj la unuan ekzempleron de PONTO – nova komuna gazeto por la Sunda Regiono. Vidu aliloke en PONTO.

**”Kultura arangô” 2001 (la 15.12)**
Ŝajnas ke nia laŭtradicia Luĉia-festo nun definitive apartenas al la kluba pasinteco. En decembro 2000 ni festis pro la 70-jariĝo de LEK. En la Zamenhofa Tago 2001 ni invitis al festa renkontiĝo por memori pri L. L. Zamenhof kaj la rolo, kiun ludas la esperantolibro.
Ni sukcesis okazigi kulturarangôn, al kiu nia studorganizo KFUK-KFUMs Studieförbund konsentis kontribui per 500.- kronoj.
Apartan dankon al ĉiuj helpantoj en la praktika arangâdo de tre agrabla festo. Ili krome regalis nin per multaj bongustaĵoj kaj nia kasistino ĝoje povis konstati, ke niaj klubaj financoj (tiumomente en vere timige malbona stato) subite konsiderinde pliboniĝis. Al tio ankaŭ kontribuis la rezulto de loterio kaj aŭkcio. Dankon al ĉiuj, kiuj malavare kontribuis. Menciindas ke bildkartoj, speciale faritaj por tiu okazo, bone vendiĝis, kio instigas nin al daŭrigo!
Fine – pri festejo – ni bonege fartis en ĝi kaj certe tien revenos. Ni estis en la IM-kafejo, en Spolegatan. Inter la 30 partoprenintoj estis tri novaj interesuloj kaj unu malnova, realiĝinto al nia klubo, nome Barbro Gangemi, Lund
Alvenis novjarsaluto el Tanzanio, kie la farado de sunkuiriloj kaj varmokonservujoj progresas. El Mwanza Ambrose Polle ĝoje rakontas pri alinfana instruado. Barnabas Magesse, Bukoba-Kajanga sendis raporton pri la lerneja sistemo en Tanzanio, laŭ peto de Åsa Andersson. Menciindas novjarsaluton de niaj geamikoj en Montendre kaj Tampereo, kio atestas, ke kunlaboro inter ili kaj LEK daŭre okazas. Novaĵo: komenciĝis interkluba kontakto inter LEK kaj grupeto en Bunda, Mara.
Al nia kara Olle ni pere de la unua numero de PONTO volas sendi tre, tre karajn salutojn. Olle, ni ofte parolas pri vi kaj ni kore volas vin danki pro via grandanima kontribuo al nia kluba agado dum la jaro 2001. Fartu bone!

Elkore, ĉiuj membroj de
La Esperantoklubo de Lund

**Kontaktuloj:** A-M Lange, 046-14 73 09. aŭ rete, Allan Ljungstedt – allan.ljungstedt@telia.com

**La Tago de Zamenhof en Lund 15.12**
30 personoj, junaj kaj maljunaj el diversloke, plenigis la ĉambrojn en IM kiam la Esperantoklubo en Lund celebris Zamenhofan tagon kaj la Tagon de la Libro. Dum spicvina trinkado Anna-Maria Lange bonvensalutis nin kaj rakontis pri la vivo de L. Zamenhof kaj pri kelkaj interesaj Esperantolibroj. Ann-Louise Åkerlund rakontis pri la fama verkisto Trevor Steele, kiu naskiĝis en Aŭstralio 1940. Lia romano ”Neniu ajn papilio” estis proklamita ”La Verko de la Jaro 2000” de la Literatura Foiro.
Ulla Saether legis pripensindan historieton de Tage Danielson kaj la konatan La Koboldo de Viktor Rydberg. Post kafo kaj ”Stollen”-kukoj kaj torto Johan Svenonius informis pri la hejmpaĝo de Sunda Esperanto Agado kaj montris la enhavon de ĝi. Li ankaŭ kreis diskutforumon por la regiono kun la e-poŝtadreso agado-l@agado.net
La lasta programpunkto estis aŭkcio, kiun gvidis Ulla Saether. La aĉetemo estis granda kaj la diversaj objektoj rapide malaperis.
Ni tre gratulas la klubon al ege bonarangîta ”Tagoj” kaj esperas ke ĝi estu tradicio. Gertrud kaj Karin

# AKTUALA ESPERANTO-AGADO EN LA SUNDA REGIONO



| | | |
|---|---|---|
| Dimanĉe 10.02 | KEH, Helsingborg | JARKUNVENO |
| Merkrede 13.02 | KEM, Malmö | Viva gazeto – ni ĝojas pro via kontribuo! |
| Lunde 18.02 | KKG, Kopenhago | ”Prof. D-ro Kálman Kalocsay – portreto de Esperanto-pioniro, poeto kaj lingvisto”. Prelego de bibliotekisto Torben Svendsen |
| Lunde 18.02 | DEFA, Kopenhago | Studvespero |
| Merkrede 20.02 | KEK, Kopenhago | Lernado laŭ la Paroliga E-kurso de Aleksander Kogan |
| Sabate 23.02 | KEH, Helsingborg | SEA – SUNDA ESPERANTO AGADO 2:a planeringsmötet, se sid 1! |
| Lunde 25.02 | DEFA, Kopenhago | 3x20 minutoj = diversaj temoj |
| Merkrede 27.02 | KEM, Malmö | JARKUNSIDO, vidu tagordon paĝo 2 |
| Lunde 04.03 | DEFA, Kopenhago | je 18.30 komuna manĝado, poste Studvespero |
| Dimanĉe 06.03 | KEK, Kopenhago | Preparo al la dana jarkunveno 16-an kaj 17-an de marto en Vejle. Informoj pri la UK en Brazilo la 3-an ĝis 10-a de aŭgusto |
| Lunde 11.03 | DEFA, Kopenhago | 3x20 minutoj = diversaj temoj |
| Merkrede 13.03 | KEM, Malmö | Libro-aŭkcio – Bokauktion Här finns massor att fynda på esperanto och svenska! |
| Sabate-dimanĉe 16-17.03 | Vejle | DANAJ JARKUNVENOJ Pli da informoj poste |
| Dimanĉe 17.03 | KEH, Helsingborg | Aktualaĵoj en la vivo aŭ en la esp.gazetaro |
| Lunde 18.03 | DEFA, Kopenhago | Studvespero |
| Lunde 25.03 | DEFA, Kopenhago | 3x20 minutoj = diversaj temoj |
| Merkrede 27.03 | KEM, Malmö | Kunveno |
| Merkrede 03.04 | KKG, Kopenhago | ”Parapsikologio” Prelego de psikologo Gert Rønsby |
| Lunde 8.04 | DEFA, Kopenhago | Je 18.30 komuna manĝado, poste studvespero |

**Informoj pri horoj kaj adresoj ktp. sur paĝo 6!**

**Klubo Esperantista de Malmö, K.E.M.**
La kunvenoj komenciĝas je la 18.30 h
en Kronetorpsgatan 94, 212 27 Malmö
Kontaktpersonoj: sten@agado.net aŭ karin@agado.net
Karin Lindquist, Sergels väg 14 A, 217 57 Malmö,
tel. 040-98 01 20

**Klubo Esperantista de Helsingborg, K.E.H.**
La kunvenoj okazos je la 14-a horo en Faktorsgatan 5. Bonvolu informiĝi ĉe Ann-Louise, tel. 042-291262 aŭ 042-186639 (oficejo) aŭ ĉe Barbro tel. 042-121471,

**Fervojista klubo en Kopenhago, DEFA**
Kunvenejo Vasbygade 10. Kontaktulo: Astrid Birkbak, tel. 44 97 43 29
Ĉiun lundon retbabilejo inter la horoj 19a kaj 22a je adreso: lendir.karelia.ru/chat/

**Konversacia Esperantista Klubo, Kopenhago, K.E.K.**
kunvenas en "Indre By Medborgerhus", Ahlefeldtsgade 33, 1.n-ro 2, KBH.k. (5 -10 min. de Nørreport) la 1-an kaj 3-an merkredojn de monatoj, 19a - 21.30a horo. Prezidanto : Jytte Sunekær, tel. 0045-44 48 47 26, e-poŝto: jytte.sunekaer@mail.tele.dk Hejmpaĝo de KEK www.esperanto.dk/kek

**Kopenhaga Kultura Grupo, K.K.G.**
Aranĝoj en Medborgerhuset, Danasvej 30 B, atingebla per buslinio 29 el stacio Vesterport,
salono n-ro 1, dua etaĝo. Pordoj malfermitaj 19.00-23.00.
Ĉiu prelego okazos ĉ. 19.30 – 20.30.
Se vi deziras detalojn pri la prelegoj aŭ havas demandojn pri la aranĝoj bonvolu turni vin al
Torben Svendsen, Vanløse Alle 57, DK-2720 Vanløse. Tel. 0045-38 74 97 64´ rete: torsven@vip.cybercity.dk

## Jarkunveno de DEA, DEFA kaj Esperanto-Forum

16-17.03 2002
okazos en Kulturvaerket, Blegbanken 2, Vejle.

La temo de la jarkunveno estas ”Mitoj”.
**Sabato 16.03**
Kultura programo kun prelegoj en Esperanto de Ziko Sikosek kaj danlingva prelego pri Esperanto por la ”fremduloj”. Lumbildprelego pri Vjetnamio de Jan kaj Lene Niemann. Instruado pri salso kaj popoldanco. Infanĝardeno. Komuna fotado. Ekspozicio. Eble eĉ lingvokurso. Promenado en la urbo. La tradicia kugloludo ”petanque”. Festmanĝo. Distraĵo. Dancado. Kantado. Konkursoj. Libroaŭkcio. Lotumado. Esperantofilmoj - interalie tiu de Esperanto-Desperado.
**Dimanĉo 17.03**
09.30 Ĝeneralkunveno de DEFA
10.30 Ĝeneralkunveno de DEA
12.00 Tagmanĝo
13.00 Daŭrigo de la ĝeneralkunveno de DEA
14.00 Ĝeneralkunveno de Esperanto Forum
Eltiraĵo el Esperanto en Danio 6/2001.
Vojaĝi tien kaj reen de Kopenhago kostas DKK 400 je 5-foja tondbileto. DKK 480 por unu bileto. Ĉiun horon eblas vojaĝi.
Loĝeblecoj: hoteloj kaj migrula hejmo.

Jytte Sunekaer





Ann-Louise Åkerlund rakontis pri Trevor Steele, nun ĝenerala direktoro de UEA

## SignoSolvo 1.0

Kiel teknikaj pioniroj ni utiligas la programaron SignoSolvo skribita precipe por nia listo de Mats Attnäs. Ĝi uzas ruzan teknikon nome plurpartaj retleteroj (angle multipart), kio signifas ke uzantoj de Unikodaj aŭ “html” kongruaj retpoŝtprogramoj (alivorte la plej multaj programoj) vidas la esperantoliterojn (ĉŝĝĥĵŭ) ĝuste, kaj nekongruaj programoj vidas la tipojn x-kodigite (vidiĝas kiel cx, gx ktp) sendepende de ĉu la sendinto uzis x-kodon, Unikodon aŭ Latina3.

Respondeculoj de esperantaj listoj estas invititaj provi kaj se ili ŝatas kaj volas instali la programaron. La programaro estas PERL-skripto, kontaktu Mats Attnäs (mats@barbanet.com) por pli da informo.

Johan Svenonius